

Juillet - Août
Julio - Aŭgusto
2007

Esperanto la verda stelo



ASSOCIATION
ESPERANTISTE
Dumonata revueto
numero 44

esperanto94.info

KALENDARO

30 juin – 1er juillet : Stand à la fête de l'OH à Choisy le Roi.

30 août : Réunion du C.A. à la salle de Champigny sur Marne.

Samedi 6 octobre :

14h-16h : Babilrondo avec Tereza.

16h-17h30 : Projection du film en espéranto, Gerda malaperis.



Un stand
pour présenter l'Espéranto
Rendez-nous visite
Amenez vos parents et amis
faites- le savoir autour de
vous !

PROMOUVOIR L'ESPÉRANTO

LA RUSSIE S'INTÉRESSE A SON RÔLE PROPÉDEUTIQUE

Rusio interesigas pro ĝia propedeŭka rolo

150 CYCLISTES EN FONT PARLER SUR 600 KM EN DIX JOURS

150 biciklantoj paroligos pri ĝi laŭ 600 km dum 10 tagoj

IL EN EST QUESTION AU PARLEMENT EUROPÉEN

Temas pri ĝi en eŭropa parlamento

ANDRÉ CHERPILLOD EN CONFÉRENCE A CHOISY

André Ŝerpilo prelegas en Ŝoazi

ÇA BOUGE, IL FAUT AMPLIFIER LE MOUVEMENT

REVUE BILINGUE : ESPERANTO – FRANCAIS

TEMARO	TABLE DES MATIERES
<p>p. 2 Temaro 150 biciklantoj kaj 600 km</p> <p>p. 3 Dek tri nobelpremiitoj ĉe Eŭropa Parlamento Sidnejo : kurso por trejni Esperanto-instruistojn.</p> <p>p. 4 Moskvo, konferenco pri «Propedeŭtika esperanto »</p> <p>p. 5 Gerda Malaperis !</p> <p>p. 6 Dancodrinkejoj</p> <p>p. 7 « La Fumado » 7a festivalo de la akvo</p> <p>p. 8 André CHERPILLOD prelegis en Choisy 2008 : internacia jaro de la lingvoj</p>	<p>p. 2 Table des matières 150 Cyclistes et 600 Km</p> <p>p. 3 Dix prix Nobel au Parlement Européen Sydney : Un cours d'entraînement pour Instituteurs</p> <p>p. 4 Moscou, conférence sur la propédeutique de l'Espéranto.</p> <p>p. 5 Gerda a disparue !</p> <p>p. 6 Les Guinguettes</p> <p>p. 7 « La Fumée » 7^{ème} festival de l'OH</p> <p>p. 8 André CHERPILLOD a fait une conférence à Choisy 2008 : année internationale des langues</p>
Imprimerie Spéciale	
Poŝtadreso : LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France	Direktoro : Sébastien CARREZ (01.43.78.55.19) Courriel : esperanto94@laposte.net Redaktorino : Tereza (01.45.76.10.57) Korektanto : Claude GICQUEL Sendanto : Oktavio

150 BIKIKLANTOJ, 10 TAGOJ, 600 KM

Temas pri 150 biciklantoj de la 2a ĝis la 70a jaroj, kiuj biciklas 600 kilometrojn en 10 tagoj. Fakte, la infanoj sub la 7a ne biciklas sed ili sidveturas en trenveturilo (tirata de siaj gepatroj) kaj la infanoj ekde la 7a biciklas solaj aŭ sur aldonaj bicikloj kroĉitaj al unu el la gepatra biciklo.

Ne terurigu pri la distanco, finfine temas pri nur 60 kilometroj tage en 8 horoj, ripozaj tempoj inkluzivataj !

La afero estas iomete politika ĉar le celo estas ankaŭ promocii la biciklon kaj oni estas akceptataj en ĉiuj etapoj de la urbestro.

Tradicie, ĉiam estas esperantistoj, kaj ili vere estas bonvenaj (oni parolas pri ni kiel "niaj esperantistaj amikoj"). En 2005 ni estis 5. Ni multe parolis pri esperanto al ne esperantistoj kaj eĉ faris unu informovesperon.

Praktike, oni devas bicikle porti niajn aĵojn. Oni ne bezonas tendon ĉar oni loĝas en sporthalo sed oni bezonas matracon kaj dormsakon. La nutraĵo estas biologia kaj vegetara kaj la vespermanĝo estas preparita de kuiristoj.

Tiu ĉi somero ni veturos de :

Bruselo (Belgujo) al Parizo (Francujo)

De la 20a ĝis la 29a de julio 2007

Johano el Belgujo.



<http://membres.lycos.fr/dynamobile>

150 CYCLISTES, 10 JOURS, 600 KM

Il s'agit de 150 cyclistes de 2 à 70 ans, qui parcourront à bicyclette 600 km en 10 jours. En fait, les enfant de moins de 7 ans ne pédaleront pas, mais seront assis dans une petite remorque (tirée par un parent) et les enfants de plus de 7 ans pédaleront seuls ou sur des vélos accrochés à la bicyclette d'un de leurs parents.

Pas d'affolement à propos de la distance, il ne s'agit que de 60 km par jour sur 8 heures, temps de repos inclus !

L'affaire est un peu politique car le but est de faire la promotion de la bicyclette et on est accueillis à toutes les étapes par le maire.

Traditionnellement, participent des espérantistes, ils sont bienvenus (on parle de nous ainsi : « nos amis espérantistes ». En 2005, nous étions 5, nous avons beaucoup parlé de l'espéranto à des non-espérantistes et même organisé une soirée d'information.

En pratique, on transporte son matériel sur le vélo. Pas besoin de tente, nous logeons dans les salles de sports, mais il faut un matelas et un sac de couchage. La nourriture est biologique et végétarienne et le repas du soir est préparé par des cuisiniers

Cet été nous irons de :

Bruxelles (Belgique) à Paris (France)

du 20 au 29 juillet 2007

Jean de Belgique.

Reinhard Selten parolis pri Esperanto
en la Eŭropa Parlamento

Pro la Tago de Eŭropo la 9-an de majo, dek tri nobelpremiitoj estis invititaj en la Eŭropan Parlamenton. Inter ili troviĝis la esperantisto Reinhard Selten.

Li estis prezentita de la prezidanto de la Parlamento kiel esperantisto, kaj li mem levis la demandon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto dum sia parolado.

Laŭ la oficiala komunikado de EU * Reinhard Selten emfazis la rapidan ekonomian integriĝon de Eŭropo en la lastaj kvindek jaroj kaj diris, ke la sukceso de la mona unuiĝo estis "io neimagebla" antaŭe. Grandparte tio laŭ li ŝuldiĝas al "la sendependeco kaj engaĝiĝo de la Eŭropa Centra Banko".

Poste Reinhard Selten konstatis, ke la ekonomia integriĝo ankoraŭ ne estas kompleta, kaj laŭ li, por tio oni unue devus lerni "sin senti eŭropanoj". La ĉefa problemoj rilate tion troviĝas en la lingva baro, kaj necesas solvo longperspektiva kaj justa.

Neniu lando rajtas
malgajni

Do, neniu lingvo devus havi superecon super alia. Konsekvence, li alvokis al la lernado kaj uzo de Esperanto. Laŭ Selten, temas pri lingvo "facile lernebla" kaj li proponis ke en la landoj de la EU oni studu Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon.



Scipovi esperanton, estas egalece havi komunikadon kun ĉiu popolo el la mondo. Ĉiu faras paŝon al la alia. Neniu parolanto trudas al la alia sian naskiĝlingvon.

Konsultu nian paĝaron esperanto94.info, vi trovos en ĝi informojn, ĉu por sekvi niajn kursojn, ĉu por studi pere de Internet.

EL AŬSTRALIA UNIVERSITATO

Pasintjare la universitato de Novsudkimrujo en Sidnejo (Australio) kreis kurson por trejni Esperanto- instruistojn. Temis pri 6 monata kurso (148 horoj). Tri esperantistoj ĉestis la kurson. Dum tiu kurso ni ĉeestis klasojn kune kun studentoj, kiuj lernas instrui aliajn lingvojn ol Esperanton ; sed ankaŭ estis klasoj nur por la esperantistoj.

Profesoro Daniel Kane instruis nin en esperanto. Ni lernis instrui laŭ la komunikmetodo. La universitato ankaŭ kreis pasintjare 9 semajnan kurson por komencantoj kaj ni tri estontaj esperanto-instruistoj havis la eblecon ekzerci instrui al vera klaso de komencantoj. Por ricevi la diplomon ankaŭ necesis krei instrumaterialojn por 20 hora esperanto-kurso.

Kun ĝojo mi hodiaŭ ricevis mian diplomon.

Reinhard Selten parle de l'Espéranto
au Parlement Européen

En raison du jour de l'Europe, le 9 mai, treize « Prix Nobel » furent invités au Parlement Européen à Strasbourg. Entre eux se trouvait un espérantiste Reinhard Selten.

Il fut présenté à ce titre par le Président du Parlement, qui lui-même souleva la question du problème linguistique et de l'Espéranto au cours de son exposé.

Selon le communiqué officiel de UE * Reinhard Selten insista sur la rapidité de l'intégration de l'Europe au cours des 50 dernières années et dit que le succès de la monnaie unique était inimaginable avant. Cela en grande partie, selon lui, grâce à l'engagement de la « Banque Centrale Européenne ».

Ensuite Reinhard Selten indiqua que l'intégrité économique était encore incomplète, et selon lui, on devrait « apprendre à se sentir européen ». Le problème principal étant la barrière linguistique, qui mérite une solution à long terme et juste.

Aucun pays ne doit perdre

Donc, aucune langue ne doit être supérieure à une autre. En conséquence, il prône l'étude et l'utilisation de L'Espéranto. Selon Felden, il s'agit d'une langue « facile à apprendre » et propose que dans les pays de l'EU, on étudie l'Espéranto comme première langue étrangère.

Connaître l'Espéranto, c'est pouvoir communiquer à égalité avec tous les peuples du monde. Chacun fait un pas vers l'autre. Aucun des locuteurs n'impose à l'autre sa langue maternelle. Il n'y a pas d'hégémonie.

Consultez notre site esperanto94.info vous y trouverez des informations, soit pour fréquenter nos cours, soit pour étudier par internet.

D'UNE UNIVERSITE AUSTRALIENNE

L'an dernier l'université de la Nouvelle Galle du Sud à Sydney (Australie) a créé un cours pour instituteurs espérantistes : 6 mois (148 h). Trois espérantistes suivirent ce cours. Durant ce cours, nous étions avec des étudiants, qui instruiront des langues autres que l'Espéranto ; mais il y avait aussi des cours réservés aux espérantistes.

Le professeur Daniel Kane nous enseignait en espéranto, selon une méthode de communication. L'université a aussi créé l'an dernier un cours de 9 semaines pour débutants où nous trois, futurs enseignants d'espéranto purent enseigner à une vraie classe de débutants. Pour obtenir le diplôme, il fallait créer des outils d'enseignement pour un cours d'espéranto de 20 heures.

C'est avec joie qu'aujourd'hui, j'ai reçu mon diplôme !

INTERNACIA PROPEDEŬTIKA
KONFERENCO

CONFÉRENCE PROPEDEUTIQUE
INTERNATIONALE

La 13-an de aprilo en Moskvo, en la sidejo de Rusia Akademio pri Klerigo, okazis Internacia konferenco “Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj”. La celo de la konferenco estis pridiskuti la iniciaton de sciencistoj-esperantistoj enkonduki Esperanton en studplanojn de diversnivelaj klerigejoj de Rusio.

La konferencon partoprenis 48 personoj el 7 landoj (Hungario, Germanio, Japanio, Nederlando, Rusio, Ukrainio, Usono), 26 el ili estis neesperantistoj.

El neesperantistoj al la konferenco estis invitataj funkciuloj el la Ministerio, de la Akademio pri Klerigo, Moskva Ŝtata Lingvistika Universitato, reprezentantoj de Rusia kaj Moskva Dumaĵoj kaj el aliaj institucioj. Estis invitataj ankaŭ ĵurnalistoj el televido kaj gazetaro.

La diskuton partoprenis speciale invitataj eksterlandaj gastoj: prof. György Nanovszky el Hungario, prof. Günter Lobin el Germanio, prof. Akira Morita el Japanio, doc. Wim Jansen el Nederlando, Mikaelo Lineckij el Ukrainio kaj Steven Cobb el Usono.

Post la enkondukajn parolojn por la diskuto, dum kafpaŭzo la reprezentanto de la Ministerio s-ino Nelli Rozina deklaris: «Atendu de la Ministerio nenian subtenon. Ni nenion decidados».

El tiu deklaro eblas konkludi kial el la 9 personoj, rekomenditaj de la Ministerio por la konferenco, partoprenis nur 2 kaj kial ili ne akceptis de la rezolucio por obstrukcii la aranĝon.


Tio tamen ne havis sukceson, ĉar post viglaj diskutoj pri la problemoj la ĉeestantoj unuanime akceptis rezolucion, pledantan subteni efektivigatajn eksperimentojn en Rusio, celantajn riveli kaj konfirmi propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanto en studplanojn, samrajte kun ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj, kiel helpon antaŭ lernado de fremdaj lingvoj.

Laŭ la materialoj de la konferenco estos eldonita libro kun tekstoj de elpaŝoj kaj videofilmon.

Liana Tuĥvatullina
admin@ejusto.ru

Vic-rektoro de Eŭropa Universitato
« Justo »

Certa nombro da universitatoj en la mondo proponas al siaj studentoj studi ESPERANTON, ebligante ilin akiri poentojn.



Le 13 avril à Moscou, au siège de l'Académie Culturelle Russe, a eu lieu une conférence internationale sur le « Rôle propédeutique de l'espéranto dans l'apprentissage des langues étrangères ». Le but de la conférence était de discuter la proposition des scientifiques espérantistes d'introduire l'espéranto dans les différents programmes des établissements d'enseignement russes.

Y participaient 48 personnes de 7 pays (Hongrie, Allemagne, Japon, Hollande, Russie, Etats-Unis), 26 d'entre eux n'étaient pas espérantistes.

Parmi les non-espérantistes, étaient invités des fonctionnaires du Ministère, de l'Académie Culturelle, de l'Université de linguistique, des représentants des doumas russes et moscovite et d'autres institutions. Etaient aussi invités, des journalistes de la télévision et de la presse.

Ont particulièrement participé à la discussion les invités, étrangers : prof. György Nanovszky el Hungario, prof. Günter Lobin d'Allemagne, prof. Akira Morita du Japon, doc. Wim Jansen de Hollande, Mikaelo Lineckij d'Ukraine et Steven Cobb des Etats-Unis.

Après les paroles d'introduction à la discussion, pendant une pause café, la représentante du ministère Nelli Rozina a déclaré : « N'attendez de la part du Ministère aucun soutien, nous ne déciderons rien »

De cette déclaration, on peut conclure pourquoi sur les 9 personnes désignées par le Ministère, seules deux participèrent et n'acceptèrent pas la résolution, pour faire obstruction à cet arrangement.

Toutefois, ils ne réussirent pas, car après de vives discussions sur le thème, les participants unanimement acceptèrent la résolution, plaidant pour des expérimentations en Russie, afin de révéler et confirmer la valeur propédeutique de l'Espéranto et d'introduire la langue internationale dans tous les programmes au même titre que les autres langues étrangères, comme aide à l'apprentissage des langues.

Au point de vue matériel, un livre avec des textes d'informations et des films seront produits.

Liana Tuĥvatullina
admin@ejusto.ru

Vice recteur de l'Université Européenne
« Justo »

Un certain nombre d'universités dans le monde propose aux étudiants d'étudier l'ESPERANTO, leur permettant ainsi d'acquérir des unités de valeur.

Gerda Malaperis ! (Gerda a disparue !) (n°2)

Tiré du site <http://fr.lernu.net>

Linda: Tom!

Tom: Kio okazas al vi ? Vi estas pala ! Bela, sed pala.

Linda: Tom! Ne rigardu!

Tom: Kio okazas?

Linda: Strange! Okazas io stranga, io tre stranga. Tiu ulo, tiu nova studento... Ne, ne, mi petas vin, ne rigardu. Estu diskreta.

Tom: Diable! Diru al mi. Kio estas tiu mistero?

Linda: Lia mano agas strange. Rigardu, se vi volas, sed plej diskrete. Turnu vin iomete, eble, sed tute nature. Li ne vidu, ke vi rigardas al li.

Tom: Vi pravas. Io stranga okazas. Dum ŝi ne rigardas al li -- ŝi nun rigardas al la granda spegulo -- lia mano iom post iom, tre tre malrapide, proksimiĝas al ŝia taso...

Linda: Estas io en lia mano.

Tom: Mi ne vidas. Li estas tro malproksima. Diable! Tiu alta forta knabo nun staras inter ili kaj mi. Mi ne plu vidas.

Linda: Sed mi vidas. Mi vidas bone. Mi vidas tre bone. Mi vidas tute bone. Ej!

Tom: Kio okazas?

Linda: Ŝi rigardas al li nun, kaj lia mano haltas.

Tom: Kaj kio plu? Diru al mi!

Linda: Nun li parolas al ŝi. Li montras al la pordo.

Tom: Eble li volas, ke ŝi rigardu al alia direkto, ke ŝi ne plu rigardu al li.

Linda: Prave, tute prave. Jen ŝi rigardas al la pordo. Li plu parolas kaj parolas. Dum ŝi ne rigardas al lia direkto, lia mano plu proksimiĝas al la taso. Ej!

Tom: Kio? Kio okazas?

Linda: Lia mano revenas, tute diskrete, kvazaŭ tute nature.

Tom: Ĉu estas io en lia mano?

Linda: Nenio plu. Sed tute certe nun estas io en ŝia taso.




agi	agir	dum	pendant	Ke	que	pordo	porte
alia	autre	forta	fort(te)	Kvazaŭ	Comme si	prava	correct
alparoli	adresser la parole à	halti	s'arrêter	Mano	Main	proksimiĝi	s'approcher
bona	bon(ne)	iĝ	devenir	mistera	mystérieux	stari	se tenir debout
bone	bien	inter	Entre	montri	montrer	strange	bizarrement
certa	certain(e)	io	quelque chose	natura	naturel	turni	tourner
ĉu	est-ce que	iom	Un peu	ne plu	plus maintenant	vidi	voir
diskreta	discret	Junulo	Un jeune	peti	demander	voli	vouloir

LA DANCODRINKEJETOJ (Les guinguettes)

Vera simbolo de la marnoborda kulturo, la dancodrinkejetoj konsistigas markantan elementon de la riveromarnaj bukloj.

Ilia historio estas ligata je la laboristaj libertempoj kaj je la dimanĉoj pasitaj sur la riverobordoj, por pratiki diversajn aktivecojn tre ofte ligitajn je la akvo sed ankaŭ por amuziĝi kun la foiraj ludoj.

Oni ĉetablĝis por gustumi simplajn manĝaĵojn, servitajn kun blanka aŭ nigra vino. Poste oni dancis.



La nunfranca vorto “guinguette” devenas de la malnova franca vorto “guiguer” (gige) aŭ “giguer” (ĵige) kiu signifas salti.

La dancodrinkejetoj kreskiĝis je la fino la 17a jarcento, en la vilaĝoj apud la ĉefurbo, kiel Belleville, Montmartre kaj aliaj, ĉar oni ne pagis la urban limimposton koncernante la aĵojn enirantajn Parizon.

Do, la vinoj produktitaj ĉirkaŭ Parizo, nomitaj tiam “guinguet”, estis malplikoste venditaj.

Ĉirkaŭ la jaro 1860a, la ĉefurbo pligrandiĝis kaj aneksis la malproksimajn vilaĝojn.

La vendejoj foriris al la marnaj kaj sejnaj bordoj, kunigante la riverĉirkaŭojn kun la plezuroj je manĝado kaj danco.

Fine de la 19^a jarcento la vestoj kutime metitaj dimanĉojn estis tre konsilindaj en tiuj ejoj, kun la ĉapelo nomita “canotier”.(kanotje)

Aperas novaĵo alportita de la italaj elmigrantoj ekaperis : la akordiono.

Poste la 1906^a jaro, la respubliko ĝeneraligis la finsemajnajn ripozojn. La marnbordoj fariĝis familiaj kaj amataj ejoj favorigitaj pro la fervojoj.

Iam, oni kalkulis ĉirkaŭ 200 dancodrinkejojn. Ili multe inspiris la muzikajn, pentraĵajn, verkistajn, fotografiajn, kinejajn artistojn.

La unua partio de la 20a jarcento estis la oraĝo por la dancodrinkejoj, jam de la fino de la jaroj 1960, la inklino foriri pli malproksimen por la semajnfinaj ferioj, anoncis ilian ekfiniĝon.

De tiam, multnombraj estas malkonstruitaj. Hodiaŭ, 4 ankoraŭ aktivas en la departemento Val de Marne: du en Champigny, unu en Joinville, unu en Villeneuve St Georges.

LES GUINGUETTES

Véritables symboles de la culture des bords de marne, les guinguettes constituent un élément marquant des boucles de la marne.

Leur histoire sont liée aux loisirs ouvriers et aux dimanches au bord de l'eau, pour y exercer diverses activités très souvent liées à l'eau, mais aussi pour s'amuser avec les jeux de foire.

On s'attablait pour savourer une cuisine simple, servie avec des vins blancs ou rouges . Puis on dansait.

Le mot guinguette vient du vieux français giguer ou giguer, qui signifiait sauter.

Les guinguettes se sont développées à la fin du 17^{ème} siècle, dans les villages voisins de la capitale, tels que Belleville, Montmartre, et d'autres, afin d'éviter l'octroi, ancienne taxe sur les marchandises entrant dans Paris.

Ainsi les vins produits autour de Paris, nommés guinguet, étaient vendus beaucoup moins chers.

Autour des années 1860, Paris s'agrandit et annexe les villages environnant.

Les établissements émigrent sur les bords de marne et de seine, associant les rivières aux plaisirs de la table et de la danse.

A la fin du 19^{ème} siècle , dans ces lieux, les tenues du dimanche deviennent de rigueur avec entre autre le célèbre canotier.

Apparaît une nouveauté apportée par les immigrants italiens, l'accordéon.

A partir de 1906, la république généralise le repos hebdomadaire. Les bords de marne deviennent des lieux familiaux appréciés, favorisés par le chemin de fer.

On comptabilisait alors jusqu'à 200 guinguettes. Elles inspirèrent des artistes musicien , peintres, littéraires, photographes, cinéastes.

La première partie du 20^{ème} siècle fut l'âge d'or des guinguettes, alors que depuis la fin des années 60 le choix d'aller plus loin les fins de semaine annonçait leur fin.



Les Guinguettes, selon Van Gogh

Depuis beaucoup ont été détruites. Aujourd'hui il en reste 4 dans le département du Val de marne : deux à Champigny sur Marne, une à Joinville le Pont, une à Villeneuve St georges.

« LA FUMADO » Eldono « SIDES »
FUMANTOJ, FRATOJ MIAJ !

« LA FUMADO » Edition « SIDES »
FUMEURS, MES FRERES !

En 230 paĝoj, Profesoro Robert MOLIMARD, fama tabakologo, kiu kreis en 1983 la tabakologian societon kaj en 1986 la unuan universitatan diplomon pri tabakologio, fudamente analizas, priskribas kaj klarigas kial kaj kiel normala homo sklaviĝas falante en la retoj de la plej danĝera drogo.

En 230 pages, le Professeur Robert MOLIMARD, tabacologue renommé, qui a créé en 1983 la société de tabacologie et en 1986 le premier diplôme universitaire de tabacologie, analyse les bases, décrit et explique pourquoi et comment un homme normal devient esclave en tombant dans les filets de la plus dangereuse des drogues.

Plej danĝera pro tio, ke tabako pro la fumo ne nur venenigas la fumanton, sed estas vera plago por la apudaj nefumantoj.

Profesoro MOLIMARD mem tradukis en klara esperanto sian libron « LA FUME » eldonita ĉe « Sides ».

Li pritraktas ne nur la medicinas flankon de tiu socia problemo, sed analizas kiel komplikaj estas la Ŝtato, la tabakindustrio kaj la laboratorioj.



Plus dangereuse car la fumée non seulement empoisonne le fumeur, mais est une vraie plaie pour les non-fumeurs voisins.

Le professeur MOLIMARD a traduit lui-même en espéranto son livre « LA FUME » édité chez Sides.

Il ne traite pas seulement du côté médical de ce problème social, mais analyse combien sont complices l'Etat, l'industrie du tabac et les laboratoires.

Kiel skibas la aŭtoro « Mi esperas ke en tiu libro la fumantoj trovos sian vojon al Damasko ».

Comme l'écrit l'auteur « J'espère que les fumeurs trouveront dans ce livre leur chemin de Damas ».

Profe soro MOLIMARD prélegis en esperanto okaze de la SATamikara Kongreso 2007 en Bordoza, por prezenti tiun libron.

Le professeur MOLIMARD a donné une conférence lors du congrès de SATamikaro 2007 à Bordeaux, pour présenter ce livre.

Diskonigi ĝin fariĝas socia devo.

Le faire connaître est devenu un devoir social.

Disponebla ĉe libroservo de la asocio kontraŭ 20 €, plus eventuala sendokosto.

Disponible à au service de librairie de l'association contre 20€, plus frais de transport.

Bernard Schneider

Bernard Schneider

7a festivalo de la akvo

7e festival de l'OH

Du tagoj por festi akvon kaj eltrovi la pejzaĝojn de la departemento Val de Marne.

Deux jours pour fêter l'eau et découvrir les paysages du département 94

Ŝipopromenadoj, muzikoj, dancoj kaj multe da aktivecoj rilataj je la akvo : sportaj, ludaj, eltrovaj estas proponitaj.

Promenades en bateaux, musiques, danses et beaucoup d'activités en rapport avec l'eau : sport, jeux, recherches sont proposées.

Por la unua fojo de sia kreado, la festivalo okazos dum somero : la 30an de junio kaj 1an de julio.

Pour la première fois de sa création, le festival aura lieu en été : les 30 juin et 1er juillet.

En la centro de la manifestacio, la riverego Sejno kaj la rivero Marne kaj ankaŭ la multnombraj riveretoj kiuj irigacias la departementon.

Au coeur de la manifestation le fleuve « Seine » et la rivière « Marne » et aussi les nombreuses petites rivières qui irriguent le département.

Forta tempo de tiu festo rilatos la kanadan riveregon Saint Laurent, honora gasto de la festivalo.

Un temps fort de ce festival aura pour thème le fleuve canadien « Saint Laurent », hôte d'honneur du festival.

Dank'al eltrovoj kaj diskutadoj pri la akvo, kunigantaj la ĉirkaŭajn, pedagogiajn, sciencajn, solidarecajn aspektojn, la festivalo ambicias ŝanĝi la rilatojn de la civitanoj kun iliaj vivrimedoj.

Des découvertes, discussions à la fois sur l'eau, les aspects environnementaux, pédagogiques, scientifiques et de solidarité, le festival ambitionne de changer le rapport des citoyens avec leurs moyens de vivre.

La programo de la festo disponas ĉe la reto :
www.festival-oh.org

Le programme de la fête est disponible sur internet :
www.festival-oh.org

**ANDRE CHERPILLOD PRELEGIS
EN CHOISY**

**ANDRE CHERPILLOD À FAIT UNE
CONFÉRENCE À CHOISY**

La vicurbestro Sro Frédéric TISLER, respondeculo de CCAS, akceptas nin.

L'adjoint au Maire M. Frédéric TISLER responsable du CCAS nous accueille.

Instruisto, li jam delonge konas kaj aprezas la franclingvajn verkojn de André Cherpillod. Estis kelkaj 30 personoj kiuj ĉeestos la prelegon de André Cherpillod.

Instituteur, il connaît depuis longtemps et apprécie les ouvrages en Français de Cherpillod. Ce sont quelques 30 personnes qui assisteront à la conférence d'André Cherpillod,

A. Cherpillod, Granda Ora Vortar' 1998a kaj granda ŝampiono de la diktaĵo el Amerikoj 1999a, est membre de l'académie d'espéranto. Li estas verkisto de multaj verkaĵoj franc- kaj esperantlingve, Granda elekto disponeblas por konsulti kaj aĉeti post la prelego..

A. Cherpillod, Grand Dico d'Or 1998 et grand champion de la dictée des Amériques en 1999, est membre de l'académie d'espéranto. Il est l'auteur de nombreux ouvrages et brochures en français et en espéranto, un large choix sera d'ailleurs disponible à l'achat et à la consultation à l'issue de la réunion.

Dum pli ol unu horo (ĉar neceso liberigi la ĉambron pro preparo al la baloto), A. Cherpillod kaptos la atenton de la ĉeestantoj atentemaj kaj interesitaj; alportanta al ili, kiel li bone scias fari, vivantajn informojn kaj nedubeble konvikantajn pri la valoro de esperanto.

Pendant plus d'une heure (car il faudra libérer la salle précocement, en raison de la préparation de l'élection), A. Cherpillod tiendra son assistance attentive et intéressée, lui apportant, comme il sait bien le faire des informations vivantes et sans aucun doute convaincantes sur la valeur de l'espéranto.

Por fini la debaton, M. Tisler diras sin konvinkita, ke eble estus bone, en akordo kun la asocio, krei esperanto-atelieron, kun la grupo de la maljunuloj de CCAS.

Pour clore le débat, M. Tisler se dit convaincu et qu'il serait peut-être intéressant, en accord avec notre association de créer un atelier d'espéranto avec le groupe des anciens du CCAS.

Ni esperas ke tiuj kiuj estos bone informitaj povos siavice informi siajn geinfanojn, genepojn, amikojn kaj konatulojn.

Nous espérons que les personnes présentes bien informées, pourront à leur tour présenter l'espéranto à leurs enfants, petits enfants, amis et connaissances.

Esperanto, komunikilo, ankaŭ helpas la junulojn plifacile lerni fremdajn lingvojn, ankaŭ por la malplej junaj, ĝi estas perfekta ilo por trejni sian memoron.

L'espéranto, outil de communication, aide les jeunes à mieux apprendre les langues étrangères et pour les plus anciens, c'est un excellent outil d'exercice de la mémoire.

Tereza

Tereza

2008 : INTERNACIA JARO DE LA LINGVOJ

**2008 : ANNEE INTERNATIONALE DES
LANGUES**

Ĝenerala Asembleo de UNO, la 16-an de majo 2007

Assemblée générale de l'ONU, le 16 mai 2007

la ĝenerala asembleo proklamas la jaron 2008 « internacia jaro de lingvoj », kiel provo akceli unuecon en diverseco kaj tutmondan interkomprenon.

L'assemblée générale proclame l'année 2008 « année internationale des langues » pour essayer d'accélérer l'unité dans la diversité et la compréhension entre les peuples du monde.

La Asembleo, ankaŭ rekonante, ke la Unuiĝintaj Nacioj subtenas plurlingvismon kiel rimedon por tutmonde akceli, protekti kaj konservi diversecon de lingvoj kaj kulturoj, emfazis la gravecon super ĉio de la egaleco de la ses oficialaj lingvoj (la araba, la ĉina, la angla, la franca, la rusa kaj la hispana) de la Organizaĵo.



L'assemblée, reconnaissant aussi, que les Nations Unies soutiennent le plurilinguisme comme remède mondial pour accélérer, protéger et conserver la diversité des langues et des cultures, accentue l'importance de l'égalité des six langues officielles (arabe, chinoise, anglaise, française, russe et espagnole) de l'organisation